

P. Alberto Maggi OSM

Notoj - februaro 2010

LA BONA PAŜTISTO

(Jo10,11)

La bildo de Jesuo kiel "Bona Paŝtisto" estas sendube la plej kara al ĉiuj kristanoj de ĉiuj tempoj.

Oni devas tamen sin demandi ĉu la sukceso de tiu bildo ne devenas pli de la malriĉiĝo de la evangelia esprimo ol de ĝia kompreniĝo. Fakte tiu bildigo, por la kristanoj ŝarĝita je trankviliga tenero, kolerigis la tiuepokajn aŭskultantojn.

Jesuo ankoraŭ ne finis sin difini "Bona Paŝtisto" ke la ĉeestantoj lin difinas "demonhavanto kaj ekster si mem" (Jo 10,19) kaj kiam li finas sian paroladon "refoje la Judoj kolektis ŝtonojn por lin ŝtonumi." (Jo 10,31).

Oni devus sin demandi ĉu la Judoj estis tiom obtuzaj kaj miskomprenis la belajn kaj trankviligajn esprimojn, aŭ ĉu la kristanoj transformis la mesaĝon de Jesuo al iu trankviliga produkto uzenda por devotismo tiom langvora, kiom sterila kaj iluziiga.

Por kompreni kion Jesuo povas esti dirinta tiel skandaliga por la oreloj de la popolestroj kaj tiel grava por la kristanoj, oni devas reiri al la bildo de la paŝtisto al kiu Jesuo referencas.

Kunteksto

La kunteksto en kiu Jesuo depostulas esti la "bona paŝtisto" estas la disputo kun la fariseoj post la resanigo de la denaska blindulo (Jo 9,1).

La popolestroj "'forpelis" [ekbalon] (Jo 9,34) la denaskan blindulon kiu, post reakiro de la vidkapablo, rekonis en Jesuo la senditon de Dio.

Tiuj ne povas agnoski ke pere de malobservo de la sabata ordono, kiun eĉ Dio observas, iu povus bonon fari. Ne povante akcepti ajnan kontraŭdiron de sia doktrino, il klopodas nei la veron de la okazaĵo, enŝovante la dubon de trompo kaj, veniginte la gepatrojn de la tieldirita resanigita blindulo, akuzas ilin esti je la origino de la trompo. ("Ĉu tiu estas via filo, kiun vi diras esti denaske blinda? Kiel eblas ke li nun vidas?" Jo 9,19).

Ĉar ne eblas ke la dogmatiko eraru, oni kontestas la faktojn. La resaniĝo de la filo estas konsiderata de la aŭtoritatuloj kiel krimo pri kiu la gepatroj devas respondeci.

Kutimiĝinte trovi en la sanktaj libroj, verkitaj antaŭ jarcentoj, validan respondon por ĉiu okazaĵo de siaj samtempuloj, la religiaj ĉefoj opinias ke ili nenion devas lerni aŭ modifi, kaj vidas en ĉiu novaĵo atencon al Dio kiu fiksas porĉiame en sia Leĝo la konduton de la homo, al kiu restas nur sin submeti al normoj antaŭfiksitaj en aliaj tempo kaj por aliaj homoj.

La ĉefoj, eĉ je risko nei la evidentecon, ne povas agnoski la resaniĝon de la homo, ĉar tio malfortigus la aŭtoritatecon de ilia instruado. Kaj se iu pro tio devas suferi, ne gravas, Dio lin prizorgos. Ilia teologia juĝo estas pli valora ol la sperto de la homo, kaj ĉar ilia juĝo estas neeraripova kaj do neŝanĝebla, estas la homoj kiuj devas sin submeti al ili.

Per mallonga parolado (Jo 10,1-6) Jesuo avertas la ĉefojn ke efektive ne estas ili kiuj forpelas la personojn de la sinagogo, sed estas li kiu ilin liberigas ("kiam li forpelis [ekbalê] ĉiujn sian ŝafojn" (Jo 10,4).

La ĉefoj de la popolo povas submeti la popolon ĝis kiam tiu estas blinda, sed post kiam ĝi reakiras la vidon, ĝi jam estas for de ilia regado.

Depostulante esti la vera "paŝtisto de la ŝafoj" (Jo 10,2)" veninta por ke ili havu la vivon kaj ĝin havu abunde" (Jo 10,10), Jesuo denoncas ĉiujn aliajn supozitajn ŝafistojn, la religiajn estrojn, difinitajn de Jesuo ĉiuj ŝtelistoj kaj banditoj (Jo 10, 2.8), kiuj, post enprizonigo de la popolo [ŝafoj] ene de la religia institucio [baraĵo], ne eniras ĝin "krom por ŝteli, mortigi kaj pereigi". Tiuj paŝtistoj estas danĝeraj kiel lupoj: ambaŭ ŝtelas, mortigas kaj pereigas.

En la evangelio laŭ Johano la vorto "ŝtelistoj" (gr. kleptês) estas uzata de la evangeliisto por la ĉefoj de la popolo (Jo10,1.8.10) kaj por Judaso, kiu "estis ŝtelisto kaj, havante la monujon, forprenadis tion kion oni metis en ĝin" (Jo 12,6).

La vorton "rabistoj" (gr. lêstês) Johano uzas por la estroj (Jo 10,1.8) kaj por Barabaso, kiu "estis rabisto" (Jo 18,40).

Laŭ Jesuo la ĉefoj estas ŝtelistoj pro la fakto ke ili alpropriigis al si la ŝafaron apartenantan al la ununura Paŝtisto, kaj estas mortigantoj pro la fakto ke, por plenumi sian ŝteladon, ili mortigos la laŭlegan paŝtiston.

Tiujn kiuj estas submetataj al tiuj ŝtelistoj kaj rabistoj Jesuo invitas eliri de la baraĵo (la ŝafejo): "Li alvokas laŭ nomoj siajn proprajn ŝafojn kaj elkondukas ilin" (Jo 10,3).

Por kompreni la prenan signifon de la vortoj de Jesuo necesas ekzameni la lingvaĵon uzatan de la evangeliisto.

Per la vorto ŝafoj en la MT oni indikas ofte la popolon de Izraelo (Ez 34,31). La verbo "kunporti, elirigi" [gr.exagô] estas la faka vorto uzata en la MT pr indiki la finon de la sklaveco de Izraelo, kiam la Sinjoro "elkondukis el Egiptujo" sian popolon (Eli 3,10; 6,27), kaj estas la legoŝlosilo por la komprenigo de la similaĵo de la "bona paŝtisto".

Jesuo elkondukas la ŝafojn for de la baraĵo (ŝafejo). Por indiki tiun lokon la evangeliisto uzas la grekan vorton aulê kiu neniam en la Biblio indikas ŝafejon, sed la korton antaŭ la Sanktejo en la Templo de Jerusalemo, centro de la juda religia institucio (Es 27,9). En Johano la vorto ripetigas ĉi tie kaj por indiki la korton de la hejmo de la ĉefpastro (Jo 18,15). Per tio la evangeliisto intencas indiki ke la promesita lando transformiĝis en lokon de subpremado kaj sklavigado el kie la Mesio devas "elirigi" la kredantojn je li.

Jesuo asertas ke "kiam li forpuŝis [ekbalê] ĉiujn siajn ŝafojn, li iras antaŭ ili, kaj la ŝafoj lin sekvas ĉar ili konas lian voĉon" (Jo 10,4).

Samkiel en la eliro la Sinjoro iras antaŭ sia popolo por ĝin konduki al la libero. Post la eliro Jesuo ne kondukas la ŝafojn en alian ŝafejon. Jesuo ne rekreas novan institucion paralelan al la antikva, sed donas la liberon. Tiuj kiuj lin sekvas estas vokataj vivi kun li (Jo 1,39) kaj unuigitaj al li (Jo 15,9).

Jo 10,11 Mi estas la paŝtisto, tiu bona [o poimên o kalos]

Mi estas: gr. Egô eimî estas la revelacia formulo utiligata en la MT por indiki la Nomon de Dio (Eli 3,14; Rea 32,39; Jes 41,4; 43,10-11). Per tiu respondo al la peto de Moseo koni lian nomon, la Sinjoro ne konigas sian nomon (identecon), sed iu agado igas lin rekonebla: esti ĉiam je la flanko de sia popolo.

Pro tio tiu de Jesuo ne estas simpla aserto de ekzisto, sed teologia formulo per kiu Jesuo depostulas la dian kondiĉon kiun li estas konscia manifesti en sia persono. Pro tio li povas aldoni ke li estas la bona paŝtisto.

Jesuo ne estas la "Bona Paŝtisto", sed "La Paŝtisto bona".

Tiu esprimo havas neniun rilaton kun la romantikaĵoj pri la "bona paŝtisto".

La greka adjektivo kalos [laŭvorte "bela"] indikas tio, kio estas vera, ideala, pefektecmodelo (vd. la vinon ton kalon (Jo 2,10) kaj la verkojn kala (Jo 10,32; Gen 1,31 LXX), kaj estas ĉiam atribuita al Jesuo. En la Midrash Rabbah pri Eli 3,1 (II,2) reĝo Davido estas priskribita kiel "la bela paŝtisto" [hebr. yâfeh rô'eh]. La adjektivo bona uzata de la evangeliisto, ne referencas al la "boneco" de Jesuo (por kiu la evangeliisto uzas ágathos, "Estas bona", Jo 7,12), sed al lia unikeco kiel Paŝtisto.

La paŝtisto bona estas la vera paŝtisto, tiu kiu rajtas nomiĝis tiele, la ununura "paŝtisto de la ŝafoj" (Jo 10,2; Is 63,11).

Jesuo proklamas sin mem la ununura paŝtisto de la ŝafaro: Tiu kiu estis anoncata de profeto Ezekielo (Ez 34,23) kaj kantata de la psalmisto, trovas en Jesuo sian plenan realigon.

Pro tio la evangeliisto evitas apliki al aliaj la titolon paŝtisto [poimnên].

En la Letero al la Hebreoj, Jesuo estas difinita "La granda Paŝtisto de la ŝafoj [laŭvorte tiu granda]" (Heb 13,20), Jesuo estas la ununura paŝtisto, kiu superas laŭ grandeco ĉiujn, eĉ Davidon kaj Moseon, la ununura en la MT difinita paŝtisto de la ŝafoj" (Jes 63,11).

La ununura fojo kiam en la NT aperas la "paŝtistoj" estas en la listo de la diservoj en Ef 4,11 ("aliaj kiel paŝtistoj [toys dè poiménas]).

La unikeco de la paŝtisto ne baras al aliaj la eblecon partopreni en lia laboro:

- por la komunumo de la kredantoj Kristo estas la ununura paŝtisto, la centro el kiu disradias la amo kaj la vivo;
- por la misio, kie la disĉiploj devos aŭdigi sian voĉon por ke aliaj estigu parton de la ŝafaro, Jesuo estas la modelo de paŝtisto kies karakterizo estos fordoni la vivon por la liajn. Kiel la Patro sendis la Filon tiel li sendas siajn disĉiplojn por eniri en la multajn baraĵojn kiuj enkarcerigas la ŝafaron por ĝin forkonduki, eĉ riske de propra vivo.

Depostulante esti la "paŝtisto bona" Jesuo referencas al du tre konataj kaj popularaj libroj de la historio de Izraelo: la profetaĵo de Ezekielo (Ez 34) kaj la unua parto de la psalmo 23 (1-4).

Ezekielo

La hebreoj deportitaj en Babilonon, post la sieĝo de Jerusalemo, esperas ankoraŭ povi reiri al sia patrujo. Vane, de Jerusalemo profeto Jeremio skribas al ili submetiĝi al la ekzilo: la deportitoj, trompitaĵoj de falsaj profetoj, ne kredas je li.

En la jaro 593-a unu el la ekzilitoj, pastro Ezekielo, estas taskata de la Sinjoro anonci al la popolo ke la plejmalbono ankoraŭ devas alveni. Fakte en la jaro 588-a Nebukadnecaro detruas Jerusalemon kaj deportas novan grupon de judoj.

Nun la hebreoj perdis ĉion: la regnon, kiun Dio promesis al Davido kiu devintus daŭri poreterne, la promesitan landon, la certecon esti la elektita popolo, kaj kriziĝis ankaŭ la fido en iu Dio kiu ilin punis pro la pekoj de iliaj prapatroj.

En ĉi tiu tragika kunteksto, Ezekielo denoncas la respondeculojn de la katastrofo kaj kuraĝigas la popolon al nova rilato kun la Sinjoro.

La profeto sin adresas, aparte, al la "paŝtistoj de Izraelo", respondecaj pri la ruino de la popolo "lupoj kiuj disŝiras la kaptitaĵon", ilin identigante :

en la potenculoj kiuj formanĝas la homojn,

en la pastroj kiuj malobservas la leĝon,

en la profetoj kiuj proponas malverajn viziojn kaj

en la bonhavuloj kiuj premas la malriĉulon (Ez 22,25-28)

La Sinjoro, ununura posedanto de la ŝafaro, forŝovos tiujn paŝtistojn, kiuj kondukas la ŝafaron "kruele kaj perforte" (Ez 34,4); kaj li surprenos ilian rolon ne regante, sed sin metante je la servo de la popolo: "Tiel diras la Sinjoro Dio: Jen, mi mem serĉados miajn ŝafojn kaj ilin prizorgos" (Ez 34,11).

Ezekielo anoncas ke la Sinjoro venas, kiel dum la unua eliro, por liberigi la popolon duoble sklavigita de la malamikoj kaj de la ĉefoj de la popolo. La Sinjoro mem prizorgos "siajn" ŝafojn. Kontraste al la paŝtistoj de Izraelo kiuj ekspluatis la ŝafaron por paŝti sin mem, la Sinjoro sin devigas konduki sian popolon al ŝirmiteco kontraŭ la malamikoj en tre trankvila situacio.

Al la ekzilitoj oni certigas ke, post la liberigo el la "buŝo de la paŝtistoj" (Ez 34,10) oni donos al ili ununuran paŝtiston: "Mi estigos por ili unu nuran paŝtiston kiu ilin paŝtados, Davidon, mian servanton. Tiu ilin kondukos al paŝtejo, estos ilia paŝtisto" (Ez 34,23). "Mia servanto Davido estos super ili kaj estos unu nura paŝtisto por ĉiuj" (Ez 37,24). Tasko de tiu ununura paŝtisto estas kunigi la Izraelidojn disajn kaj dividitajn en du regnoj (Izraelo kaj Judujo) en "unu nuran popolon" sur kiu regnos "unu nura reĝo" (Ez 37,22). Tiu unu nura paŝtisto inaŭguros "pacan interligon" kiu "malaperigos de la lando la sovaĝajn bestojn" (Ez 34,25).

Psalmo 23

De la espero elvokita de la vortoj de Ezekielo kaj de la sperto de la ekzilo naskiĝis la psalmo teologie plej riĉa el la tuta psalmaro.

En la psalmo la historio de la popolo kaj tiu de la individuo kuniĝas kaj enfluas en esprimon de plena fido en la ununura Paŝtisto, la Sinjoro kiu liberigis Izraelon el Egiptujo antaŭe kaj de Babilono poste kaj ĝin gvidis kiel ŝafaron tra la dezerto, ĝin prizorgante per akvo, manĝaĵoj kaj ripozo. Sperto kiu estas, por Izraelo, garantio pri sereneco dum la nuno kaj pri fido dum la estonto.

La komponado de la psalmo montras du apartajn temojn (vv.1-4: temo de la "paŝtisto", vv. 5-6: temo de la "gasto"). La unua verso de la unua parto estas la legoŝlosilo por la tuta psalmo: parolante pri ŝafoj kaj paŝtistoj, la psalmisto resendas al la rilato inter la homo kaj lia Dio

Sal 23,1 La Sinjoro estas mia paŝtisto

Tio kio en niaj lingvoj bezonas 5-6 vortojn, estas esprimata en la hebrea tre seke: Yahvé ro`î", nur du vortoj por aserti sendiskute ke la ununura paŝtisto tiele rekonata estas Yahvé. Ne iu ajn "sinjoro", konfuzebla inter la pluraj pretendantaj "sinjoroj", sed Yahvé. El tiu premiso, la psalmisto transiras al la sekvo:

mi mankon ne havas.

Kiam pri la popolo okupiĝis la paŝtistoj estis tragedio. Ili prizorgis sian intereson kaj ne tiun de la ŝafaro: "Ĉu la paŝtistoj ne devus paŝti la ŝafaron? Vi vin nutras per lakto, vin vestas per lano, buĉas la grasigitajn ŝafojn, sed vi ne paŝtas la ŝafaron. Vi ne refortigis la malfortajn ŝafojn, vi ne kuracis la malsanajn, vi ne bandaĝis la vunditajn, vi ne revenigis la perdiĝintajn. Vi ne iris serĉi la forerarintajn, sed ilin vi gvidis kruele kaj perforte" (Ez 34,2-4).

Kiam Yahvé prizorgas sian popolon tiu prosperas serene. Depostulante la rolon de paŝtisto la Sinjoro asertas: "Mi elserĉos la perdiĝintan ŝafon kaj revenigos al la ŝafejo tiun devojiĝintan; mi bandaĝos la vunditan kaj kuracos la malsanan, mi prizorgos la dikan kaj la fortan" (Ez 34,16).

2 Sur verdaj herbejoj [la Sinjoro] ripozigas min
al trankvilaj akvoj li min kondukas.

La ŝafaro/Izraelo scias ke, fidante je Yahvé, "ĝi paŝtos laŭ ĉiuj vojoj, kaj ŝur ĉiuj altaĵoj ĝi trovos paŝtejojn. Ĝi ne suferos malsaton nek soifon kaj ĝin ne trafos la sekeco nek la suno, ĉar tiu kiu ĝin kompatos, ĝin gvidos, ĝin kondukos al akvofontoj..." (Jes 49,9-10). La Sinjoro konas la paŝtejojn kie estas abundo por ĉiuj. Estas eĉ la akvo apud kiu la ŝafaro estas kondukata. Tiu "akvoj" estas difinitaj "trankvilaj". La vorto indikas la kondiĉon de trankvilo propra de tiu kiu estas en sekura loko for de la malamikoj: aludo al la packondiĉo al kiu alvenas tiu kiu sin konfidas al la Sinjoro kaj kiun eksplicitas la sekva verseto:

3 Li kvietigas min, Li kondukas min laŭ la ĝusta vojo
pro amo al sia nomo

La halto en la oazo "rekuraĝigas" la ŝafaron kiu sentas reveni en sin la fortojn por remarŝi laŭ la "ĝusta vojo": itinero kie oni eksperimentas la fidelecon de la homo je Dio kaj de tiu je la homo. La fideleco de Dio originas de la "amo al sia nomo". Yahvé iĝis la nomo de iu savanta Dio liberigante sian popolon el Egiptujo, tiel komprenigante tion kio li estas: iu Sinjoro kiu, malgraŭ la malfidelecoj de sia popolo, estos al ĝi ĉiam fidela.

4. Eĉ se mi iros tra valo malluma
mi ne timos malbonon, ĉar vi estas kun mi.

La "valo malluma" indikas tion kio postsekvas la morton: la transtombon. Per paradokso la psalmisto celas esprimi tiom grandan fidon je Yahvé, ke, eĉ se li finiĝus en la ŝeolon, li ne sin sentus regata de la malbono. La esprimo estas surpriziga se oni pensas ke ĝi estis verkita en epoko kiam ne ekzistis ajna koncepto pri resurekto.

La konscio pri tioma amo elfluas en ekkcion per kiu la psalmisto, flankenmetante la paroladon laŭ la tria persono, sin adresas al Yahvé per pli intima "ci" ("ĉar ci estas kun mi") kiu

referencas al la aserto ke "la Sinjoro cia Dio paŝas kun ci, ne cin lasos kaj ne cin forlasos..." (Rea 31,6).

Via bastono kaj via apogiĝilo trankviligas min.

Dum per "apogiĝilo" oni celas la kurban bastonon tipan de la vojirantoj, per la vorto "bastono" oni celas ankaŭ la sceptron (reĝan aŭ Dian). Bastono kaj spogiĝilo, videblaj simboloj de la protekto de la Sinjoro al la popolo, estas bildoj kiuj eĉ fortigas tiom grandan fidon je Dio ke ĝi obskurigas ĉiun alian certecon.

La potenculoj ĉe kiuj Izraelo serĉis helpon, ĉiuj retropaŝis en la necesomomento, kaj la ununura espero de la popolo restas Yahvé.

La paŝtisto, tiu bona, fordonas sian vivon por la ŝafoj.

Depostulante esti la Paŝtisto profetita de Ezekielo, Jesuo riĉigas ĝian bildon. La Paŝtisto ne limigas sin al protekto kaj prizorgo de sia ŝafaro, sed eĉ fordonas sian vivon por la ŝafoj.

En la peco la kvarfoja ripeto de fordoni sian vivon (vv. 11.15.17.18) substrekas ke tiu estas la kerna esenco de la tuta peco.

De la bildo de la paŝtisto, Jesuo eliminis ĉiun ŝpuron de regado: li estas la vera paŝtisto, ĉar la grandanima donaco de lia vivo ne originas el danĝero por la liaj, sed ĝin antaŭas.

Lia fino ne estas dumvoja akcidento, sed parto de la programo. La morto de la paŝtisto estos la vivo por la ŝafoj: la karno de la ŝafido estos la nutraĵo kiu permesos al iliaj la novan eliron, kaj ĝia sango ilin liberigos porĉiame de la morto.

La kapablo de Jesuo oferi sian vivon por la siaj kaj tiele elmontri la amon de la Patro ("per tio ni konis la amon: Li foroferis sian vivon por ni") estas vastigebla al tiuj kiuj plilongigos lian amdinamisman: "do ankaŭ ni devas foroferi la vivon por la fratoj" (1 Jo 3,16).

12 La soldulo male, kiu ne estas paŝtisto kaj al kiu la ŝafoj ne apartenas, vidas alveni la lupon, forlasas [aphiêsin] la ŝafojn kaj forfuĝas kaj la lupo ilin forrabas kaj ilin dispelas;

Jesuo, kiu jam avertis la ŝafaron kontraŭ la ŝtelistoj kaj la rabistoj, komparas la bildon de la paŝtisto kun tiu de la soldulo.

La lupo reprezentas minacon por ambaŭ, sed la "bona paŝtisto", al kiu la sendanĝereco de la ŝafoj estas pli grava ol la propra vivo, kaj kies tasko estas tiu "kunigi kune la dispelitajn filojn de Dio" (Jo 11,52), ĉe alproksimiĝo de la pasiono ne ilin forlasos, dum la soldulo, por kiu la propra saviĝo pli gravas ol tiu de la ŝafaro, ĉe alproksimiĝo de la danĝero forlasas la ŝafojn kiuj estas dispelotaj de la lupo.

Kiam Jesuo devos alfronti la tragedion de sia aresto kaj de sia morto, li kuraĝigos siajn disĉiplojn dironte: "Mi ne lasos vin [ouk aphêsô] orfaj." (Jo 14,18).

li estas soldulo kaj la ŝafoj ne gravas por li.

La soldulo ne estas malbona paŝtisto.

Jesuo ne rekonas al li iun rolon, kiu, eĉ se degenerinta, estus implikinta taskon flanke de Dio, sed li tiun kunigas al "ŝtelistoj kaj rabistoj", ĉar, kiel tiuj, li serĉas nur propran avantaĝon. La karakterizo de la soldulo estas plenumi iun agadon ekskluzive por propra profito kaj propra avantaĝo.

La esprimon "por li ne gravas" la evangeliisto utiligas nur ĉi tie kaj por Judaso ("Tion li diris ne ĉar gravis por li la malriĉuloj, sed ĉar li estis ŝtelisto" Jo 12,6), identigante en la soldulo la ŝteliston kaj mortigiston.

14 Mi estas la paŝtisto, tiu bona, mi konas miajn ŝafojn kaj miaj ŝafoj konas min,

Por substreki la profundan rilaton ekzistantan inter la paŝtisto kaj liaj ŝafoj kiujn "li vokas unuope" la evangeliisto utiligas la verbon "koni" [ghinôskô] kiu en la biblia lingvaĵo indikas intiman rilaton.

Tiu kono, kiu venas de la sperto de amo kiun Jesuo transdonis al la siaj, forigas ĉiun distancon kaj kapabligas tiujn kiuj donas al li konsenton, partopreni sian meman dian kondiĉon (Jo 1,12) kaj establi kun li rilaton simila al tiu kiun li havas kun la Patro. Komenca etapo de tiu rilato de intima interkonatiĝo kun la Sinjoro estas aŭskultado de lia mesaĝo kiu tradukiĝas en la sinsekvon: "miaj ŝafoj aŭskultas mian voĉon kaj mi ilin konas kaj ili min sekvas" (Jo 10,27).

Kiel la Patro konas min kaj mi konas la Patron, kaj mi fordonas la vivon por la ŝafoj.

La evangeliisto multe preteriras la konfidencan bildon de la paŝtisto kun liaj ŝafoj: la kono/amo kiun Jesuo havas por siaj disĉiploj, originas en la ligo kiun li havas kun Dio, kaj kiel la rilato ekzistanta kun la Patro puŝas la Filon al forofero de lia vivo, tiel la komuniigo inter Jesuo kaj la siaj estos tiom funda ke ĝi igos ilin kapablaj sekvi liajn paŝojn ĝis la kompleta donaco.

16 Kaj mi havas aliajn ŝafojn kiuj ne estas de ĉi tiu ŝafejo:

Ne estas nur la "baraĵo" de la judismo kiu finis sian funkcion, sed ankaŭ iu alia institucio kiu malebligas la plenan liberecon de la homoj: la "aliaj ŝafoj" kiujn la Paŝtisto devas kunigi kaj konduki.

La Mesio ne venis por reformi la instituciojn, sed por ilin forigi por krei homaron tute novan kie neniu baraĵo, kiom ajn sankta ĝi povas esti, ne trovas spacon.

Nur la farizeoj estas ekskluditaj de tiu voko al kunmeto de la ununura ŝafaro, ĉar ili ne estas la ŝafoj de Jesuo (Jo 10,26).

Ankaŭ tiujn mi devas konduki:

La evangeliisto ne indikas kien Jesuo kondukos siajn ŝafojn, ĉar li tion jam diris ĉe v. 9: la ŝafaro ne estos enfermita en aliajn baraĵojn, sed kondukata en la vivosferon de Dio, en la spacon de la plena movlibero.

*Reliefigas en la "Jerusalema Biblio" la preterlaso de la noto metita al tiu ĉe verseto de "La Bible de Jérusalem": "Non pas les amener au bercail juif, mais les agréer au troupeau que Jésus "mène" à la vie éternelle".

Ili aŭskultos mian voĉon kaj iĝos unu nura grego.

La erara traduko de la Vulgato "et fiet unum ovile" (unu nura ŝafejo anstataŭ unu nura grego) negative influis dum 1500 jaroj sur la koncepto pri Eklezio. Ankoraŭ en la sesdekaj jaroj en la teologiaj manlibroj, l'"Extra Ecclesiam nulla salus" oni pravigis per la fakto ke Jesuo "parolas pri ununura ŝafejo kaj pri ununura paŝtisto".

En la realo la paŝtisto ne enfermas siajn ŝafojn en alian ŝafejon, sed li kunmetas ununuran gregon, al kiu oni povas aparteni sen la neceso sin identigi kun la institucioj kiuj historie pretendas ĝin reprezenti.

Dum en la v. 3 la verboj estas en la as-formo ["vokas, kondukas"] ĉar ili referencis al la agado de la Mesio rilate al Izraelo, nun la verboj estas uzataj en la os-formo: la voĉo de Jesuo preterpasas la limojn de lia popolo kaj etendiĝas al la tuta homaro, laŭ la projekto de Dio.

La evangeliisto tiele konturas la mision de la Eklezio: iĝi unu nura grego per la akcepto de tiuj kiuj pretus respondi al la mesaĝo de la ununura Paŝtisto. Tiuj - per la akcepto de la ununura ordono de Jesuo, videble montros la amon de Dio al la homo en la unueco de la ununura Spirito kaj en la diverseco de la rasoj kaj kulturoj.

[kaj] ununura paŝtisto.

La similecon ekzistantan en la greka inter poimnê [grego - ŝafaro] kaj poimên [paŝtisto - ŝafisto] malfacilas redoni en aliajn lingvojn.

En la greka teksto la vortoj "grego/paŝtisto" ne estas kunigitaj per la konjunkcio "kaj" [gr. kai] (kai ghenêsontai mia poimnê, eis poimên).

La rilato de la grego kun la Paŝtisto ne estas tiu de du malsamaj realecoj (grego plus paŝtisto), sed ununura afero: la ekzisto de la grego (komunaĵo de kredantoj) enhavas en si mem la ĉeesto de la Sinjoro kaj estiĝos la nova sanktejo de kie disradios la amo de Dio por la tuta homaro, kiel asertos Jesuo pli poste en la parolado kiu antaŭos lian morton: "La glorion kiun vi donis al mi, mi ĝin donis al ili, por ke ili estu unu, samkiel ni estas unu. Mi en ili kaj vi en mi, por ke ili estu perfektaj en la unuo kaj por ke la mondo sciu ke vi min sendis kaj ke vi ilin amis samkiel vi amis min" (Jo 17,22-23).

Malsame ol la malnova la nova Sanktejo ne estas statika, senmova, atendante ke la fideluloj supreniru al la Templo. Pro la fakto ke ĝi estas kunmetata per la grego kaj per ĝia Paŝtisto la nova Sanktejo moviĝas kaj iras renkonte al tiuj kiuj estis forpelitaj de la religia institucio aŭ al tiuj kiuj pro ilia religia kaj morala kondiĉo sentas sin ne dignaj alproksimiĝi al la Sinjoro. Al ĉiuj tiuj la Sinjoro kaj lia grego laŭte aŭdigas la vorton de la Paŝtisto kiu invitas unuiĝi en ununuran amkomunaĵon.

La nova kulto kiun Dio petas ne sin adresas al li, sed ĝi estas la amoforto kiu de li ekiras kaj kiu bezonas kunlaborantojn por atingi la tutan homaron.